La unuaj du jaroj de la KER-ekzamensitemo de UEA-ITK

Fine de la jaro, dum NR kaj IF (ambaŭ internaciaj festaj aranĝoj en Germanio) ni organizis la ĉijare lastan sesion de la KER-ekzamenoj. La du paralelajn sesiojn partoprenis 9 personoj, 6 je nivelo B2 kaj 3 je nivelo C1. La kandidatoj venis el 5 landoj: Francio (1+2), Germanio (2+1) kaj el Danio, Nederlando kaj Belgio po 1 persono je B2 nivelo. La ekzamenojn gvidis Katalin Kováts, kunekzamenis Cyrille Hurstel kaj helpis Kristin Tytgat.

Nivelo / Jaro	B1	B2	C1	Sume
2009	17	25	84	126
2010	35	48	75	158
Sume	52	73	159	284

Per tiu ĉi 14a sesio ni finis la unuajn du jarojn en kiuj okazis entute 284 ekzameniĝoj, kun la partopreno de kandidatoj el 38 landoj. Se ni komparas la unuajn du jarojn ni konstatas, ke la kvanto de la ekzamenokazoj kreskis kaj duajare precipa intereso montriĝas pri la niveloj B1 kaj B2.

	Lando	B1	B2	C1	Sumo	Poentoj*
1.	Brazilo	17	16	18	51	103
2.	Francio	6	7	22	35	86
3.	Germanio	5	8	16	29	69
4.	Pollando	8	7	13	28	61

En la ranglisto de la plej diligentaj landoj momente staras Brazilo, kiun sekvas Francio, Germanio kaj Pollando.
La tuta rezulto de la 38 landoj elŝuteblas **ĉi tie** .

Aparte menciindas tri sesioj, kie la interesiĝantoj estis pli ol 30. Dum la Somera Esperanto-Semajno (SES) en Slovakio ekzameniĝis multaj junuloj kaj partoprenintoj de la pola-germana kaj slovaka Grundvigdt-projekto. En la sesio de UK en Kubo kun subvencioj de eŭropaj kongresanoj kaj membroj de edukado.net ni povis doni ekzameniĝeblon al 10 kubanoj. La tria plej multnombra sesio okazis dum la brazila kongreso, en Pirasikabo (ŝtato San-Paŭlo), kie 32 kandidatoj trapasis la skribajn ekzamenojn. Ankaŭ tiu ĉi sesio ĝuis financan helpon, ĉifoje tiun de itala subtenanto R.C. Niaj brazilaj samideanoj havos eblon daŭrigi la ekzameniĝon dum la Tutamerika Kongreso en julio 2011, kie tiufoje okazos plena ekzamensesio.

La lasta grava menciindaĵo estas la kunlaboro kun la Itala Instituto de Esperanto, kiu instigis siajn membrojn (la enlandajn ekzamenantojn) trapasi la KER-ekzamenojn por spertiĝi kaj esti testataj. La ekzamenon, financatan de la instituto, trapasis 15 italaj kolegoj, inter ili akademiano Carlo Minnaja, lia frato Nicola Minnaja, ambaŭ eminentaj kaj denaskaj esperantistoj, Fabrizio Pennacchietti, profesoro el Torino kaj ankaŭ aliaj gravuloj de la movado. Resume: la kandidatoj kontentis pri la ekzamenoj kaj ĝojis akiri unikajn spertojn. Sekve de tiu ekzameno la Itala Instituto eklaboris pri adapto de sia sistemo al la modernaj normoj de la referenckadro kaj planas ellabori regularon, en kiu ili agnoskos la KER-diplomojn kaj en kelkaj niveloj anstataŭigos la lingvajn partojn de la landa ekzamensistemo per tiu de la KER-sistemo. La kunlaboro inter la instituto kaj la UEA-ekzamenkomisiono rezultis en seminario kaj pluiros kun pliaj ekzamenoj dum la torina kongreso en 2011.

En la sekva jaro ni antaŭvidas 5-6 novajn sesiojn, el kiuj la unua okazos en Roterdamo, en la Centra Oficejo, kie atendeblas ekzameniĝo ankaŭ de pluraj CO-anoj. Mejloŝtono estos la sudfrancia sesio dum pasko, kiam unuan fojon okazos ekzamenoj en Francio kaj inter la kandidatoj estos ankaŭ pluraj

eminentaj kolegoj kaj gravuloj. La nova ministeria dekreto en Francio, laŭ kiu por dungiĝo estontaj instruistoj devos pruvi sian lingvokonon per lingvoatestilo, akirita en eŭropunia lando, Esperanto povos havi simile gravan lingvopolitikan rolon, kian ĝi jam havas en Hungario. Por ellabori kampanjon, diskonigi tiun eblon kaj amase ekinstrui Esperanton en universitatoj kaj universitataj urboj, la francaj samideanoj unue mem devos sperti kaj trapasi la KER-ekzamenojn.

La aliajn sesiojn vi povas vidi en la suba tabelo. Ĝi ne estas ankoraŭ kompleta kaj konsiderinde la fakton, ke la indikitaj sesioj okazos nur se aliĝos sufiĉe da kandidatoj, ni konsilas ke oni ĉiam informiĝu antaŭ ol - pro la ekzamenoj - oni decidas aliĝi al iu aranĝo.

Estas eblo je pliaj sesioj, sekve interesiĝantoj pri kunlanboro kaj kunorganizado kontaktu la respondeculon: Katalin Kováts

Dato	Nivelo	Loko	Aranĝo
12-02	C1	Roterdamo (NL)	Centra Oficejo de UEA
24-04	B2-C1	SÈTE (FR)	IREM
24-04	B1-B2-C1	Waldfischbach-Burgalben (DE)	PSI
30-06	B1-B2-C1	Madrido (ES)	Hispana Kongreso
9-14 – 07	B1-B2-C1	San-Paŭlo (BR)	TAKE
29-07	B1-B2-C1	Kopenhago (DK)	Universala Kongreso
22-08	B2-C1	Torino (IT)	78a Itala Kongreso

Informoj kaj ligoj pri la ekzamenoj :

- Ĉefpaĝo pri la ekzamenoj
- Laŭlanda statistiko pri la ĝisnunaj sesioj
- Afiŝo kun klarigoj pri la KER-ekzamenoj
- Priskribo de la postularo
- **Ekzamenpecimenoj**
- Prezentmaterialo kun ekzemploj por la niveno C1.
- Klarigo kaj reta diskuto pri la ekzamenprezoj

Por ajna plia demando bv. ne heziti turni vin al

katalin@ikso.net

Katalin Kováts, Ekzamenkomisiono de UEA, 7a de januaro 2011